

Baladoj pri esperanto-herooj

Verajn vivojn
el nia movado

Martin Strid 2017

Nina Langlet





La baladoj trovitaj ĝis nun

•Molle:

& Verda Ĉapo, 481 paŝoj.

•Schulhof:

& Al la memoro de grafo W. T. Stead, 515.

& Funebra kanto al la memoro de grafo L. N. Tolstoj, 350.

•Cezar:

& Ĉe kuracisto Zamenhof, 248 paŝoj.

•Corsetti:

& Hamburgen, 783.

•Kalocsay:

& Mortis Grabowski, 649.

& Je la naskiĝtago de Zamenhof post la mondmilito, 1102.

& Ni laŭdu lin..., 232.

•Strid:

& Davida balado, 2958.

& Haralda balado, 825.

& Iva balado, 870.

& Lidja balado, 310.

& Lilka balado, 884 aŭ 962.

& Valdemara balado, 7482.

& Viljama balado, 1450.

& Ĉe kuracisto Zamenhof:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 248 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Cezar "por karikaturado de la desegnisto Eder Benedetti". Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado.>

<Filmo 11>

(#Melodio: <:31> (/mi mi dolre mi mi mido re fa; mimimi mimi mido re fa;

(#Rekantaĵe: mire do do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do))x8)+(& Strofoj:

'1 "/Doktoro2 mia, kuracisto! ;
Ĉu estas ĝi inflam' de histo?

(x:; **En la ĉen', dancu nun trankvile ;
ĉiuj ni trankvilas ; jen en amika ĉen'
; dancu nun trankvile.)**

'2 Jubile mi la tagojn startas. ;
Doktoro, ĉu mi bone fartas?

'3 Mi krevos tuj pro energio. ;
Sukcesas al mi simple ĉio.

'4 Subite plenas mi de ĝojoj, ;
kurante saltas mi sur vojoj!"

'5 Doktoro Zamenhof rigardas: ;
"Jen verda koro sankte ardas."

'6 Kun ĝojo la doktoro diras, ;
ke ne malsano lin inspiras.

'7 "Amik', vi estas tute sana, ;
serĉado plua estus vana.

'8 Ne estas ja malsana tristo. ;
Vi iĝis nur esperantisto!"

& Mortis Grabowski (1):

< Rekante 31 el 59 batoj por strofo, entute 649 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (1921) "je la naskotago de Zamenhof".
Baladigis Martin Strid (2016) per nova melodio kaj rekantaĵo ĉerpita el Sinjoro Tadeo.>

(#Melodio: <:59> (

*/fa fafa mimi faafafa mimi redo mimi;
fa fafa mimi faafafa mimi fami rere;
mi mimi fafa miimimi mimi redo mimi;
fa fafa mimi faafafa mimi redo mimi;*

(#Rekantaĵe:

*fami re mido dodo TiTi dore mimi;
fami re mido doododo fami re mi mi;
fami re mido dodo TiTi dore mimi;
fami re mido doododo Tire do La La a)*

)x11)+(&Strofoj:

'1 /Ho, rimoj Esperantaj, nun tintu kun esploro, ;
Tra l' mondo portu grandan doloron voĉo via, ;
Ĉar mortis via Majstro grandpova kaj genia, ;
Per kiu vi pleniĝis de vivo kaj sonoro.

**(x: (; Lando de infaneco restos por ĉiamo, ;
Sankta kaj pura, kiel unua ekamo.)x2)**



& Mortis Grabowski (2):

(x: (; Lando de infaneco restos por ĉiamo,
; Sankta kaj pura, kiel unua ekamo.)x2)

'2 Ho, Muzo Esperanta, en la angul' vi sidis, ; En vestoj senornamaj, al Cindrulin' simile, ; Li vestis vin per silko, vin perlornamis brile, ; Kaj prenis vin ĉe mano, kaj vin solene gvidis.

'3 En halon de la Arto, en templon de la Belo, ; Sur via lir' li streĉis arĝentsonorajn kordojn, ; Kaj li agordis ilin, ke frapu vi akordojn ; Pli muĝajn ol tempesto, pli dolĉajn ol mielo.

'4 Via patron' li estis, de li vi lernis iri, ; De li vi lernis flugi kaj svingi vin ĝisalte, ; Portate de la ritmo, facile, danco-salte ; Parnason de Popoloj vi povis venkakiri.

'5 Alarmis li: Tagiĝas! Por gajno de trofeo ; Batalon iru, rimoj! Akiru novan gloron! ; Kaj ili kun triumfo alportis la trezoron: ; Jen Esperante revas jam sinjoret' Tadeo!

'6 Kaj vi ektuŝis korojn kaj koroj ĝermis florojn! ; Printempo de poemoj en nian rondon venis, ; Kaj ĉiu verso floro lin benis kaj solenis: ; Honorojn al la Majstro, ho gloron kaj honorojn!

& Mortis Grabowski (3):

(x: (; Lando de
infaneco restos
por ĉiamo, ;
Sankta kaj
pura, kiel unua
ekamo.)x2)

'7 Ho Muzo, kvazaŭ birdo, se ĝin la frosto
tuŝas, ; Vi kunflugiloj lamaj funebras, mute,
plore, ; La silkon kaj la perlojn deŝiras vi
dolore, ; Ĵetite en angulon liuto via kuŝas.

'8 Ho, Muzo Esperanta, do ne sidadu mute! ;
Se nun pro viaj larmoj eĉ malstreĉiĝis kordoj, ;
Ekfrapu ilin tamen, eksonu la akordoj ;
Obtuze, surde, ĝeme, funebre surliute.

'9 Doloron kaj funebbron sonigu, kantu krie, ;
Pri la kruela bato de l' senkompata sorto, ;
Ekmuĝos ĉiu sono ja kun milobla forto, ; Ĉar
eĥos ĝin tra l' mondo la frataj koroj ĉie.

'10 Kaj se la kant' funebra forlarmis kaj
forbruis, ; Relevu laflugilojn, denove ekflugiru,
; Ektuŝu novajn korojn, instigu kaj inspiru, ;
Kiele vin la Majstro dum sia viv' instruis,

'11 Ke rimoj Esperantaj ektintu kun
sonoro! ; Nur ili povas inde lin glori kaj
memori, ; Nin li instruis verse ekridi,
verse plori, ; Do estas ĉiu nova rim' ja lia
nova gloro!)

7/40



& Verda Ĉapo (1):

< Rekante 16 el 32 batoj por strofo, entute 832 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Gianfranco Molle. Baladigis Martin Strid.>

(#Melodio: (<2,3:4> /mi mi mi mi /so solfa mi mi; /soso sofa mi i; /mi mi re rere /mi milre do Ti; /LaTi dore mimi mire; /dodo dore mi mire /do Ti do o)x26)+(&:

'1 /Estis foje /Ĉapo2 Verda, (x:; – /**Karbo kaj forĝist'** – ;)
/bona knabo,
/multe2 lerta, (x:;
/Junaj viroj, viglaj viroj! ; /Iru plankon, dancu kun /granda em'!))

diligenta novle2rnanto (x:; – **Karbo kaj forĝist'** – ;) de la lingvo Espe2ranto. (x:; **Junaj viroj, viglaj viroj!** ; Iru plankon, dancu kun **granda em'!))**



<Filmo 37>

& Verda Ĉapo (2):

'2 Dum li iras al la grupo (x:: –
Karbo kaj forĝist' – ;)

renkontiĝas kun la lupo (x::
**Junaj viroj, viglaj viroj! ; Iru
plankon, dancu kun granda
em'!))**

deĵoranto sub servuto
de la Brita Instituto,

'3 por la svingo kaj
la lek' de la
flago "junjon-ĝek"!

.....

Kun oksforda tono
diras la lupeg':
"vi kien iras?"



'4 "Al la kurs'
konversacia de
la lingv' internacia,
.....

kaj neŭtrala kaj
facila, por la tuta
mond' utila!"

'5 - tuj respondas
Ĉapuleto kun en
man' verda libreto
.....

kaj, ĝentile salutante,
..... al la klub' ekiras
lante.



& Verda Ĉapo (3):

'6 Sed la lupo pli rapide ĝin atingas, kaj perfide
ruze trompas l' instruiston, kiu perdas la ekziston

'7 formanĝita unuglute de la lupo, kiu tute
tuj kamuflas sin simile, kaj atendas tre trankvile.

'8 Tok! Tok! Venas Ĉapo frape, kaj li haltas mire, gape... ..

"Kiel grandaj la okuloj!" "Por kontrolo de l' reguloj."

'9 - diras lupo sen ŝanceloj. "Kiel grandaj la oreloj!"

- Verda Ĉap' insiste provas. "Tiel aŭdi bone povas

'10 mi pri kaz' akuzativa." Verda Ĉapo plu naiva:

"Kial estas buŝ' enorma, kiel granda pordo forna!"



& Verda Ĉapo (4):



'11 "Por vin manĝi ja pli bone!" Kaj la lupo, senpardone,
salte kaptas Verdán Ĉapon, manĝas korpon, manĝas kapon.

'12 Lin englutas dumminute, lin kruele voras tute,
ŝiras, maĉas lin kun krako, ĝis pleniĝo de l' stomako.

'13 Kaj post tiu entrepreno, la lupeg', sen ia ĝeno,
vivis longe dumjarcente, tre feliĉe kaj kontente.)

12/40



<& Klarigo pri

Al la memoro de grafo W. T. Stead:

‘1 La ŝipo Titanic survoje de Southhampton en Anglujo al Novjorko en Usono aprile en 1912 kun 1500 homoj pereis en Norda Atlantika Maro.

; La plej fama pasaĝero pereanta kun Titanic estis William Thomas Stead ("Ŭiljem Tomes Sted"), ĵurnalisto pionira kaj fondinto de Londona Esperanto-Klubo kaj de Brita Esperanto-Asocio. Li survojis al Carnegie Hall, kien usona prezidanto Taft invitis lin paroli en kongreso pri paco.

; J. P. Morgan, usona bankisto kaj posedanto de kaj Titanic kaj ĝia "fratinŝipo" Olympic, estis veturonta samvojaĝe sed en

la tago antaŭ la foriro de Anglujo malmendis sian bileton.

; Nelson W. Aldrich, usona senatano, novembre en 1910 sekrete kunigis kvin bankistojn, inter ili tri anoj de J. P. Morgan, veture en fervoja vagono al privata klubejo en Jekyll-insulo, por ellabori leĝon pri monopolo de privata banka kartelo, "Federal Reserve Act", kiun akceptis la usona kongreso en 1913. Tiun leĝon kontraŭis krom W. T. Stead la bankistoj John Jacob Astor, Benjamin Guggenheim kaj Isa Strauss, kiuj ankaŭ pereis kun Titanic.>

& Al la memoro de grafo W. T. Stead (1):

< Rekante 62 el 101 batoj por strofo, entute 505 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Aŭtunaj floroj, The British Esperantist, 1912) kun moto "Nearer my God to thee...". Baladigis Martin Strid (2016) per sveda polsa melodio baladigita kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio: (/SoSo dodo mire TiTi refa mire; dodo mi mi sofa rere TiLa So; SoSo dodo mire TiTi refa mire; dodo mi mi sofa rere TiLa So; lala fado fala soso mido miso; fafa re Ti SoTi doTi domi soso; (#Rekantaĵe: lala fado fala soso mido miso; fafa reTi SoTi do do; SoSo dodo mire TiTi refa mire; dodo mi mi sofa rere TiLa So; SoSo dodo mire TiTi refa mire; dodo mi mi sofa rere TiLa So; lala fado fala soso miidodo miso; fafa re Ti SoTi doTi domi so; lala fado fala soso mido miso; fafa reTi SoTi do o))x5)+ (&Strofoj:

'1 /Tutan mondon skuas unu granda ĝemo ; de la oriento ĝis la okcident', ; plej funebra sonas ĉie rekviemo ; kaj la korojn premas unu sola sent' ; pro vi, kiuj laŭ mistera dia plano ; kuŝas en la profundaĵ' de l' oceano*.

(x: William Thomas, prezidanto vin invitis* ; por paroli pri la paco ; kaj vi ne komprenis ke vi jam incitis ; la bankestrojn per klarvida la sagac' ; ĉar la monopolon monan* vi tro spitis ; kaj fariĝis kontraŭ ŝtelo nun minac' ; Morgan*, kial vi malmendis vian bileton ; unu tagon antaŭ ŝipa ekvetur'? ; En vagono de sinjoro Aldrich* gastis ; vi por banka truko nur.)

& Al la memoro de grafo W. T. Stead (2):

(x: William Thomas, prezidanto vin invitis* ; por paroli pri la paco ; kaj vi ne komprenis ke vi jam incitis ; la bankestrojn per klarvida la sagac' ; ĉar la monopolon monan* vi tro spitis ; kaj fariĝis kontraŭ ŝtelo nun minac' ; Morgan*, kial vi malmendis vian bileton ; unu tagon antaŭ ŝipa ekvetur'? ; En vagono de sinjoro Aldrich* gastis ; vi por banka truko nur.)

'2 La plej granda, nobla verko de l' homaro ; kun vi ekbatalis, granda, ho, natur', ; kun vi de sekretoj plena, vasta maro, ; kun vi stranga elemento sen mezur'! ; Tamen, ve, ne estas homa fort' sen limoj, ; kaj sur fundon maran falas la viktimoj.

'3 Unu kunpuŝiĝo kaj... finiĝas ĉio! ; Mastoj tuj falegas, ; staras la radar', ; kaj la koron disŝifanta plor' kaj krio ; disvastiĝas en mallumo sur la mar'. ; Homa verko ŝanceliĝas kiel ŝelo ; kaj en ondoj dronas ankaŭ Verda Stelo.

'4 Ho, al multa hom' en hor' terura, sorta lasta rifuĝejo estas vi, Esper', ; antaŭ ol lin mara ondo, ŝaŭma, forta; portis for en strangan mondon sen mizer'. ; Ho, Espero, via plej favora aĝo ; ankaŭ dormas nun sur fund' de l' oceano.

'5 Kaj la maro ree ondojn siajn rulas ; sur profunda tomb' sen krucoj kaj sen nom', ; frosta vent' de nord' per sia kanto lulas ; ilin en plej nobla tombo de la hom': ; "En nemezureble, nekonata spaco, ; dormu, dolĉe dormu en eterna paco.")



16/40

<& Klarigoj al Haralda balado:

- '1 Harald Grønberg (1899-1984), danespo kaj instruisto.
- '2 Andreas Blinkenberg (1893-1982), profesoro pri franca lingvo kaj romanistiko en universitato de Århus 1934-1963.
- '3 Kontraŭ germanoj naziaj kiuj dum 1940-1945 Danujon okupis.
- '4 En la jaro 1943.
- '6 Dane Aarhus aŭ Århus ; "Grøn borg" signifas "verdajn burgojn".
- '9 Harald kaj edzino publikigis danan-esperantan vortaron en 1949.
- '14 Helge Bangsted (1898-1974), ĵurnalisto, estro de la dana nazia partio 1942-1945.
- '15 En urbo Skive.
- '18 Nazioj eksplodigis ĝin.
- '19 Sub grundo: kaŝiganta ; Sundo: la markolo inter Selando en Danujo kaj Skanujo en Svedujo ; Franz Blatt (1903-1979), profesoro pri klasika filologio ek de 1934, estis unu el la dek unu arestitaj ostaĝoj en Århus.
- '20 En 1932 la universitata eldonejo de Århus eldonis libreton kun la titolo: "La faŝismo: tri prelegoj pri la nova Italio". Du el la prelegantoj estis Blinkenberg kaj Blatt.
- '25 En Argentino en 1954 Unesko-konferenco akceptis rezolucion pri Esperanto malgraŭ malestima kontraŭparolo de Andreas Blinkenberg, tiama delegito de Danujo.>

Haralda balado (1):

< Rekante 19 el 33 batoj por strofo, entute 825 paŝoj dum 10 minutoj.

Sur bazo de artikolo de Jens Stengaard Larsen

(http://www.liberafolio.org/Members/jens_s_larsen/kiu-efektive-estis-blinkenberg) verkis Martin Strid (2016) laŭ melodio kaj rekantaĵo de feroa Foka balado.>

(#Kópakvæðið: <:33> (/SoSo SoFa MiRe SoSo; do dore dodo; TiLa LaLa LaLaLa TiLa; LaaSoSo SoLa SoSo; (#Rekantaje: FaMi ReMi Fa So; dodo dore do; TiLa LaLaLa LaLa TiLa;La LaSo SoLa SoSo; FaMi ReMi Fa So o))x25)+(& Strofoj:

<Filmo 54>

(x:; Bonas jen por danci ; Nova estas dom', ; trajoj estas el fer' faritaj, ; tegmento plumba krome. ; Bonas jen por danci.)



Haralda balado (2):

'1 /En popola altlernejo ;
Harald* instruas, ; Junularan
Federacion ; klere li kontribuas

(x:; **Bonas jen por danci ;
Nova estas dom'**, ; **traboj
estas el fer' faritaj**, ;
tegmento plumba krome. ;
Bonas jen por danci.)

'2 Diras Harald al
Andreo*: ; "Lingva
profesor"! ; Pri vortaro mi
havas ideon ; sed estas
amator'."

'3 Harald estas pacifisto,
; senperforton kredas. ;
En lernejoj por rezisto* ;
li prelege pledas.



Harald



Andreo

(x:; Bonas jen por danci ;
Nova estas dom', ; traboj
estas el fer' faritaj, ;
tegmento plumba krome. ;
Bonas jen por danci.)

'4 Registaro de la danoj ;
postulas pli da justo. ;
Kunlaboro kun germanoj ;
kolapsas en aŭgusto*.

'5 Ekas ĝenerala striko, ;
tuta lando protestas. ;
Okupantoj kun svastiko ;
danojn ostaĝe arestas.



'6 Kaptas ili en Orhus-urbo*
; dek unu korifeojn, ; inter ili
Verdaburgan* ; Haraldon
kaj Andreon.

Haralda balado (3):

'7 Harald kaj eminentuloj ; estos
mortviktimoj, ; sed nazioj miskalkulis: ; Ĉe
Harald mankas timo.

'8 Harald en malliberej' ; anstataŭ nenifar' ;
povas per libroj el la hejm' ; labori pri vortar'.
.....

'9 Vidas Andreo
ĵaluza ; kiel diletanto ;
Harald sian tempon
uzas ; por lingvo
Esperanto*.

'10 Liberigis Andreon
ili ; en la deka tago. ;

Dudek tagojn Harald trankvilis ; en sia verka ago.

'11 "Harald, iru el karcero, ; vin armeo gracias!" ; "Sed
restontojn ĉu danĝero ; ĉi tie ne minacas?"

'12 "Se vi ne iros en liberon ; kiel ni vin petis, ; vin
perforte el karcero ; devos ni forĵeti!"

'13 Harald do reiris hejmen ; "Kara mia edzin', ; karaj
filoj, mi envejne ; ĝojas revidi vin!"

Haralda balado (4):

'14 Vintre telefonas Andre' ; "Ĉu vi radion aŭdis? ; Redaktisto nazia* tre ; akre vin malaplaŭdis.

'15 Inter partioj demokratiaj ; en via parolad'* ; mankis tiu de nazioj ; diras la "kamarad"

'16 Dormu bone, mi esperas ; ke mi vin revidos, ; kaj atentu, nun danĝeras!" ; "Ĉu? Sed mi ne timidos."

'17 Tuj de Harald la amikoj ; pro ĉi nova minac' ; estis tute en paniko ; kaj agis per sagac'.

'18 Ili Haraldon igis fuĝi ; trans maron al Sveduj', ; poste lia domo ruĝis, ; pro eksplodo* tuj.

'19 Kun la familio "sub grundo"* ; Harald konaton ; reenkontis trans la Sundo* ; – profesoron Blatt*.

'20 "Blatt, saluton, kun Andreo ; antaŭ la milito ; pri faŝismo vi eseon ; verkis*, ĉu, sen spito?"


'21 Andreo pri la lingvo franca ; estas ege sperta. ; Li vortaron tre nuancan ; verkas majstre lerta.

'22 Harald lasis ĉe li spuron ; pro sia metodo: ; Por Andreo la kulturo ; devas esti klopodo.

'23 "Vidis mi viron sen hezito ; tajpi sian vortaron ; esperantan dum milito ; sen kulturaj baroj.

'24 Sed ne povas tiom facila ; esti lingva voj' ; dum suferas mi humila ; laboris li kun ĝoj'."

'25 Dek jarojn post la fuĝa dramo ; en Montevideo ; kontraŭ Esperanto malamon ; montris Andreo*)







& Iva balado (1):

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 1071 paŝoj dum 12 minutoj. Verkis kaj komponis Martin Strid modifub polsa melodio el Orsa, Svedujo.>

(# Melodio: (/LaLa dodo milfa mire; re doTi domi; soso soso faso laso; soso mire doTi;

(#Rekantaĵe: Lado mifa mire redo doTi domi laso mimi LaTi dodo mimi doLa TiSi La a))x37)+

(& Strofoj:

'1 /Kantos mi bala2don de ; Ivo Lapenna* ; trian gvidis lukton li por ; lingvo mondkomprena.

(x:; **En la lumon levis li Universalan Esperanto-Asocion* kaj la lingvon de l' homar'.**)

'2 Ĉe Unuiĝintaj Nacioj ; estro mondestabla ; Sciu ke la vorto iva ; signifas igkapabla.

.....

'3 Ĉe unua provo ankoraŭ ; nia majstro vivis ; sed pri bo[no de Blu]jido Bofronta* ; tro li naivis.

(x:; En la lumon levis li Universalan Esperanto-Asocion* kaj la lingvon de l' homar'.)

& Iva balado (2):

'4 Prezentiĝus Esperanto ; en Parizo pompa ; sed fiaskis* pro la vanto ; de idistoj trompaj.

'5 Post milito monda oni ; duafoje provis ; Ligo de Nacioj* volis ; pacan moron trovi.

'6 Francoj diris ke ilian ; lingvon elitan ; devas uzi tuta mondo ; civilizita.

'7 Poste nazioj venis ; ankaŭ faŝistoj ; estis espoj sur iliaj ; malliberiglistoj.

'8 Hitler* Esperanton fermis ; per perforto nuda ; nepre volis li ekstermi ; la lingvon de la judo.

'9 Espoj sovetuniaj devis ; por vivo batali ; en la laborkoncentrejoj ; de kamarado* Stalin.

'10 Pri bezono komunika ; imperioj surdas. ; La movadon en Rusujo ; Stalino murdas.

'11 Post la dua mondmilito ; estis rekomenco ; Unuiĝintaj Nacioj havis ; bonan pacintencon.

'12 Ĉu kolonia devos esti ; ĝia laborlingvo ; kvankam povas ni atesti ; multe pli bonan atingon?

& Iva balado (3):

'13 Tian lingvon oni
ĉagrenos ; pro
temporabaj studoj. ; Por
la homoj ne konvenos ;
idiomaj trudoj.

'14 Lingvo nacia
malfacilas ; per esceptoj
en vico. ; Por lernantoj
ne utilas ; gramatika
kaprico.

'15 Angla lingvo
progreson drenos ;
elparolon konfuzas. ;
Pene oni per ĝi
komprenos ; kiujn vortojn
uzas.

'16 Inter la nacioj serĉas
; Ivo apogon, ; devas
Esperanton defendi ;
kontraŭ mensogoj.



(x:; **En la lumon levis li
Universalan Esperanto-
Asocion* kaj la lingvon
de l' homar'.)**

'17 Peticion subskribis
naŭcent ; mil individuoj ;
kaj organizoj aplaŭde ;
kvincent kontribuoj

'18 En Urugvajo Unesko
; Esperanton traktos ; ĉar
ĉe membroj scioj kreskas
; pro Ivo pri la faktoj.

'19 Delegacio de
Meksiko ; ĉe la
konferenco ; donis por la
lingvo indikon ; de bona
intenco.

'20 De lingvistika fako ;
oni konsilon petas, ; sed
jen Blinkenbergatako ;
kvazaŭ analfabetas.

'21 Lerte li la petskribon
tondis ; per mensogoj
tute ; kaj rajtis Ivo
respondi ; nur triminute.
.....

& Iva balado (4):

(x:; En la lumon levis li Universalan Esperanto-Asocion* kaj la lingvon de l' homar'.)

'22 Voĉdono unua estis ; nia malvenko
; sed malcede Ivo restis ; bola sur la
benko

'23 "Ĉu ciferojn romiajn do ; por
eĉ pli granda klaro? ; Mo co mo lo
i kaj vo ; signifas nunan jaron.

'24 Blinkenberg nian lingvon
komparis ; kun urugvaja menuo ;
pri ties malestimo ; nun mi faros
bruon! ...

'25 La programkomisiono rifuzis ;
pro moko de la dano." ; Tion Ivo
ruze uzis ; ĉe montevidanoj.

'26 Fine do Unesko akceptis ; lian proponon ;
kaj konsentis ĉiam respekti ;
esperantorezonon.

'27 Dek du jarojn poste Ivo ; frontis pli grandan
defion: ; Al Unuiĝintaj Nacioj ; faris ni peticion.
.....

'28 Sepdek milionoj da homoj ; Esperanton
apogis. ; Imperiaj idiomoj ; ne ilin allogis.

'29 Sed ankaŭ tiam gajnis ; koloniaj potencoj. ;
Nova lingvo al ili ŝajnis ; mise konsekvenci.

& Iva balado (5):



(x:; En la lumon levis li
Universalan Esperanto-
Asocion* kaj la lingvon
de l' homar'.)

'30 En universitato Kembriĝa ; du studentoj
ronkis ; apud Johano Putoj prestiĝa ; estis
Hamfri Tonkin.

'31 Ili la regon anglan amis ; kaj fanfarone ;
volis per ĝi vaste fami ; potenculojn kone.

'32 Dermode per satiro mokis ; "Ivo diktatoras"
; kio Ivon tre provokis ; "Kiu vin sponsoras?"

'33 Puĉis ne la komunistoj ; en UKo Hamburga
; angloamerikaj statistoj ; lerte dramaturgas.

.....


'34 Post la fia kalumnio ; estas mia sento ; Al
la monda asocio ; mankas jam la dentoj.

'35 Sed ne kredu vi ke estas ; konspiracio, ; se
oni al vi ridetas, ; fidu al tio.

'36 Kaj naive kredu, kara, ;
ke ĉiuj homoj bonas, ; kaj
batalon cedu ĉar ; perfidon
vi ne konas.

'37 Kaj la vivo estu glata ; kaj la
tero plata ; kaj ne ronda ĉar la
mondon ; vidas vi trompata.)

28/40





Valdemara balado

Rakonto pri kelkaj
plej fruaj espaj
pioniroj, poste pri
amasa vivsavado
sub faŝisma reĝimo

Martin Strid



Valdemar Langlet
1872-1960



Nina Borovko-Langlet
1896-1988

& Valdemara balado (1):

< Rekante 15 e 29 batoj por strofo, entute 7482 paŝoj dum 1 horo kaj 14 minutoj. Verkis kaj komponis Martin Strid (2015).>

(# Melodio: <:29> (/lala sofa fami mifa; sola laso fami; lala sofa remi fala; sofa fami mire;

(#Rekantaĵe: mifa so so; la3la lala lala lala so so; dodo dore mi; mifa so so)

)x258)+(& Strofoj:

,& Unua parto. Devenoj:

'1 /Venu jam kunigi nin ; en ĉendancon feroan* ; ĉar ni historion konu ; kaj fieru heroan.

(x:; **Kantu forte ; frape paŝu dancon kaj ridetu ; belas nova tag' ; kantu forte.**)

'2 Nun aŭskultu jen baladon : belan mi rakontos ; pri sinjoro kuraĝa kiu ; duran devon frontos.

'3 En Francujo hugenotojn* ; reĝo persekutis. ; Fuĝis Langleoj de l' despoto ; kaj ekzilon salutis.



& Valdemara balado (2):

'4 En Svedujo poste loĝis ; bona arĥitekto ; ĉar lia prapatro fuĝis ; tien vivprotekten.

'5 Verkis fabelojn por infanoj ; kaj instruajn librojn ; fraŭlino Matilda* kun elano ; voĉis amajn vibrojn.

'6 "En Sudermanlando* vivas ; arĥitekto sperta. ; Estrajn domojn kaj preĝejojn ; li konstruis lerta.

'7 Por norvega parlamento ; Emil* desegnis domon. ; Plu famigis teatrejo ; Dramen lian nomon."

'8 "Svaton jesu, edziniĝu ; al sinjoro Langleo ; ne pro riĉo kaj prestiĝo ; sed familia kreo."

(x:; **Kantu forte ; frape paŝu dancon kaj ridetu ; belas nova tag'** ; kantu forte.)



& Valdemara balado (3):

(x:; **Kantu forte ;
frape paŝu dancon kaj ridetu ;
belas nova tag' ;
kantu forte.**)

'9 Spetebihale* post la nupto ; hejmon faris ili ; vivis
honeste sen korupto ; kvar ŝi naskis filojn.

'10 Frato Filip* inĝeniero ; kun Nobel' laboris ; poste pri
konstruteĥniko ; Stokholme profesoris.

'11 Frato Abrahamo* ĥemion ; diligente studis. ;
Profesoro heliuman ; pezon li konkludis.

'12 Frato Aleksandro* artisto ; rajdi ĉevalon ŝatis ; pentris
mondon de ekzisto ; povas mi konstati.

'13 Valdemar'* plej juna filo ; de Emil kaj Matilda ; kreskis
intelekte brila ; en homamo milda.



ДРЪ ЭСПЕРАНТО.

МЕЖДУНАРОДНЫЙ
ЯЗЫКЪ.

ПРЕДИСЛОВІЕ

и

ПОЛНЫЙ УЧЕБНИКЪ.

por Rusoj

Чтбы языкъ былъ поспѣшимъ, не
достаточно назвать его терминомъ.

Цѣна 15 копѣекъ

ВАРШАВА.

Типо-Литографія Х. Кельбергера, ул. Новоземель № 11.

1887.

& Valdemara
balado (4):



'14 En Polujo judo juna* ; kreis novan lingvon. ; Varsovie li eldonis ; per doto tiun atingon.

'15 Libron cenzuristo rigardis ; en tempo de siringoj ; en la rusa, pola, germana ; franca kaj angla lingvoj.

'16 Unuan libron li al homoj ; diverslanden sendis ; kaj reagojn de ranguloj ; kun espero atendis.

(x:; Kantu forte ; frape paŝu dancon kaj ridetu ; belas nova tag' ; kantu forte.)

& Valdemara balado (5):

'17 Lernis verkisto
Tolstoj dum horo ;
la gramatikon tute
; kaj post studo
duhora ankoraŭ ;
komprenis
absolute.

(x.; **Kantu forte**
; **frape paŝu**
dancon kaj
ridetu ; belas
nova tag' ;
kantu forte.)



& Valdemara balado (6):

'18 Dekkvinjara Antonina* ;
Esperanton lernis ; ĉar ne volis
venkon finan ; atendi ĝis eterne.

'19 Skribis ŝi leteron kaj ; al
Zamenhofo sendis. ; Lin kortuŝis
vortoj ŝiaj. ; Bone respondendis.

'20 "En Simferopolo instruas ; mi ĝin
al kamaradoj. ; Pensoj homaranaj
influas ; dum la lingva studado.

'21 Ni nun esperanton kune ; ku2n
ĝojo lernas. ; Volas generacio juna ;
vivi mondon modernan."

(x:; **Kantu forte ; frape
paŝu dancon kaj ridetu ;
belas nova tag' ; kantu
forte.**)



& Valdemara balado (7):


'22 Venis vortoj de la majstro ; ankaŭ al Upsalo. ; Otto* ordiniĝis pastro ; en la katedralo.

'23 "Valdemaro, ho studanto ; de l' universitato* ; lingvon rigardu Esperanton ; certe vi ĝin ekŝatos."

'24 Valdemar' kaj Otto Zejdlico ; studis la novan lingvon. ; Ĉiu poste en sia ofico ; bone sin distingos.

'25 Ili societon faris* ; por lingvo Esperanto. ; elektiĝis Valdemaro ; ĝia prezidanto.

(x:; Kantu forte ; frape paŝu dancon kaj ridetu ; belas nova tag' ; kantu forte.)



& Valdemara balado (8):

(x:; **Kantu forte ;
frape paŝu
dancon kaj ridetu
; belas nova tag' ;
kantu forte.**)



'26 Ludoviko pensas pri ; homara paca
pado: ; "Ĉu la lingvo internacia ; fariĝos
monda movado?"

'27 Mondolingvo Volapuko* ; perdas da
prestiĝo. ; decidis Nurenberga klubo ;
esperantistiĝi*.

'28 Volapukon trafis jam ; forlaso kaj
disfalo. ; Klubon esperantan fondis ;
junuloj en Upsalo.

'29 Dua klubo kaj unua ; por nur
Esperanto, ; estu lumo por movado ;
monde malgiganta."

'30 "Kara mia edzo, vi ; ne estu
maltrankvila. ; Vian lingvon lernas jam ;
anaro tuj multmila."

'31 De Valdemara balado nun ; jen
parton la unuan ; finas ni sed dancos
kune ; baldaŭ* la parton duan.



& Valdemara balado:

(Pionira tempo)

- ,& *Unua parto. Devenoj:* '1-31
- ,& *Dua parto. Ruslandon:* '32-81
- ,& *Tria parto. Revojaĝe:* '82-126

(Dua mondmilito)

- ,& *Kvara parto. Hungarlandon:* '127-170
- ,& *Kvina parto. Ruĝakruce:* '171-219
- ,& *Sesa parto. Militfine:* '220-258

Dankon!

Martin kaj amikoj de Granda Kurlo



<http://tretis.tone.se>